POLA ESPERANTISTO

4 • julio-aŭgusto • 1971 Zł 6.–

ANTONI GRABOWSKI

vidu la paĝon 4

Antoni Grabowski

(1857—1921)

Mortis Grabowski

Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun ekploro,
Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via,
Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia,
Per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.

Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis,
En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile,
Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile,
Kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.

En halon de la Arto, en templon de la Belo,
Sur via lir' li streĉis arĝentsonorajn kordojn,
Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn
Pli muĝajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.

Via patron' li estis, de li vi lernis iri,
De li vi lernis flugi kaj svingi vin ĝisalte,
Portate de la ritmo, facile, danco-salte
Parnason de Popoloj vi povis venkakiri.

Alarmis li: Tagiĝas! Por gajno de trofeo
Batalon iru, rimoj! Akiru novan gloron!
Kaj ili kun triumfo alportis la trezoron:
Jen Esperante revas jam sinjoret' Tadeo!

Kaj vi ektuŝis korojn kaj koroj ĝermis florojn:
Printempo de poemoj en nian rondon venis,
Kaj ĉiu versofloro lin benis kaj solenis:
Honorojn al la Majstro, ho gloron kaj honorojn!

Ho, Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frosto tuŝas,
Vi kun flugiloj lamaj funebras, mute, plore,
La silkon kaj la perlojn deŝiras vi dolore,
Ĵetite en angulon liuto via kuŝas

Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute!
Se nun pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj,
Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj
Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.

Doloron kaj funebron sonigu, kantu krie,
Pri la kruela bato de l' senkompata sorto,
Ekmuĝos ĉiu sono ja kun milobla forto,
Ĉar eĥos ĝin tra l'mondo la frataj koroj ĉie.

Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis,
Relevu la flugilojn, denove ekflugiru,
Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru,
Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis,

Ke rimoj Esperantaj ektintu kun sonoro!
Nur ili povas inde lin glori kaj memori,
Nin li instruis verse ekridi, verse plori,
Do estas ĉiu nova rim' ja lia nova gloro!

(1921)

KALMAN KALOCSAY

La 4-an de julio 1971 estas pasintaj 50 jaroj de post la morto de Antoni Grabowski, post Zamenhof — historia — la dua plej meritoplena pioniro de Esperanto ne sole sur la pola, sed ankaŭ sur la internacia grundo. „Princo de la esperanta poezio", „patro de la esperanta poezio", tradukinto de centoj da polaj kaj alilingvaj poemoj en la internacian lingvon, frontloke kun la mondfama traduko de „Sinjoro Tadeo" de Adam Mickiewicz, pioniro de la evoluigado de la esperanta vorttrezoro.

Pro tiuj ĉi grandaj meritoj, la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio decidis organizi vastan agadon ne nur en Varsovio, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj centroj de la esperantista movado en Pollando (filioj vojevodiaj, distriktaj, lermejoj, rondoj ktp.), por digne festi tiun ĉi 50-an datrevenon de la morto de Grabowski. Estas do planataj:

— organizado de publikaj prelegoj pri la vivo kaj verkaro de Antoni Grabowski,

— centra solenaĵo ĉe lia tombo kaj en iu granda varsovia salonego.

Pro tio ankaŭ la Redakcio de „Pola Esperantisto" deziras konatigi sian legantaron kaj pere de ĝi — la tutan esperantistan kaj Esperanto-amikan publikon pri la vivo kaj verko de tiu ĉi nia granda pioniro — en ĉi tiu artikolo.

Sed — sur kia bazo?

En la fama „Pola Biografia Vortaro" („Polski Słownik Biograficzny"), eldonata de la Pola Akademio de la Sciencoj jam ekde la intermilita periodo kaj kontinuigata nun de nia Akademio de post ĉ. 15 jaroj, aperis antaŭmilite en la Volumo VIII (kajero 36, paĝo 485) tre bona, sur la bazo de gravaj dokumentoj apogita vivo-kuro de Grabowski, verkita de prof. Janina Ender, verkintino de aro da historiaj verkoj kaj lernolibroj por mezlernejoj, tiam vigla aktivulino de la Pola Esperanto-Asocio en Varsovio, kune kun historiisto, d-ro Marek Wajsblum, prezidanto de la Laborista Esperanto-Asocio „Praca-Laboro", loĝinta ankaŭ en Varsovio.

Tiu ĉi artikolo estas tiel riĉenhava kaj bone prilaborita, ke ni ne opiniis necese fari novan redaktadon, sed simple tradukis ĝin el la pola lingvo en Esperanton, iome mallongiginte per forlaso de malpli gravaj aferoj kaj aldonante nur ĥronologian bibliografion de la plej ĉefaj verkoj de Grabowski. La tutan laboron prenis sur sin nia kolego, Jan Zawada, gvidanto de la biografia fako en la Redakcia Komitato por la pola parto de ESPERANTA ENCIKLOPEDIO de UEA, nun preparata.

LA REDAKCIO

Kaj jen la teksto el la „Biografia Vortaro":

Antoni Grabowski naskiĝis la 11-an de junio en la 1857 jaro en Nowodobre, en la bieno de siaj gepatroj — Franiciszek kaj Antonina, naskita Sumińska, apud Chełmno (hodiaŭ la vojevodio de Bydgoszcz).

Post kelka tempo la gepatroj translokiĝis al la iama rusa parto de Pollando, nomata oficiale Pola Reĝolando (Królestwo Polskie), kaj populare Kongresówka, sed la elementan instruon la filo Antoni ricevis en sia naskoregiono, la mezgradan en t. n. reala gimnazio en Toruń. Poste li studis en la universitato de Wrocław (tiame alinomita de la germanoj

Breslau). Li studis speciale ĥemion, sed krome ankaŭ la natursciencojn, filozofion kaj lingvistikon. Dum tiuj ĉi studoj li estis en la jaroj 1869/70 membro de la Slavliteratura Societo (Towarzystwo Literacko-Słowiańskie) en Wrocław, kiu propagandis kaj subtenis inter la pola studentaro amon al ĉio gepatra.

Post la fino de la universitata studado, en la jaro 1882 li laboris komence en Zawiercie (Reĝlando), poste en Warnsdorf — (la hodiaŭa Ĉeĥoslovakio) kaj specialistiĝis kiel ĥemiisto-kolorigisto de teksaĵoj. Poste li formigris al la centra Ruslando (ĉirkaŭ 1887) kaj transprenis tie la postenon de direktoro de la teksaĵfabriko „Paluŝina i Derbiejeva" en la industria urbo Ivanovo-Voznjesjensk. Li multe kontribuis al plibonigo de la kvalito de produktaĵoj de tiu ĉi fabriko kaj faris tie kelkajn eltrovojn pri teksaĵkolorigado. Unu el ĝi estis oficiale patentita en Germanujo.

En la jaro 1898 li revenis hejmen kaj restis jam ĉiam en la Pola Reĝlando — komence en sia propra bieno en la distrikto Brzeziny. De post la jaro 1904 li ekloĝis en Varsovio, kie li restis ĝis la fino de sia vivo. Tie li estis tre aktiva membro de la „Ĥemia Sekcio de la Societo por la Disvolvado de la Industrio kaj Komerco" (originale: Sekcja Chemiczna w Towarzystwie Popierania Przemysłu i Handlu), kiu en la jaro 1909 transformiĝis je Rondo de Ĥemiistoj ĉe la Societo de Teknikistoj (originale: „Koło Chemików przy Stowarzyszeniu Techników"). Li publikigis en la organo „Chemik Polski" („Pola Ĥemiisto") siajn fakajn artikolojn kaj tradukis tiutempe kune kun Wincenty Humnicki (instruisto de Komerca Lernejo) el la angla lingvo en la polan „Lernelibron pri ĥemio" de Ira Remsen (usona ĥemiisto).

La plej grandan atenton li turnis tamen al la problemo de la *pola ĥemia vorttrezoro.* Li iniciatis agadon por unuecigo de la pola ĥemia terminaro, verkinte tiucelan studon sub la titolo „Pri nia ĥemia terminaro" (originale: „O terminologii naszej chemicznej"), publikigitan en la serioza scienca revuo „Wszechświat" (La Universo) n-ro 13, el la jaro 1900. Tiu ĉi studo estis pridiskutita kolektive de la supre nomita „Ĥemia Sekcio", poste submetita al prijuĝo fare de lingvistoj kaj prezentita de Bronisław Znatowicz (1851—1917) ĥemiisto, redaktoro de „La Kosmo", poste „Pola Ĥemiisto", ĉe la IX Kunsido de Kuracistoj kaj Natursciencistoj en la jaro 1900 en Krakovo.

En la jaro 1919, do jam en la libera pola ŝtato, li estis unu el la ĉefaj kunfondintoj de „Pola Ĥemia Societo" (originale: Polskie Towarzystwo Chemiczne) kaj fariiĝis membro de ĝioa Vortara Komisiono. Multegaj el la ĥemiaj fakvortoj de li proponitaj estis aprobitaj kaj pro tio ĉi Grabowski apartenas al la kunkreintoj kaj kunfiksintoj de la ĝisnuna pola ĥemia terminaro.

Lia eksterordinara kono de multaj lingvoj (ĉirkaŭ 30) kaj profunda lingvistika interesiĝo altiris lin jam en la jaro 1886 al la problemo de internacia lingvo (do unu jaron antaŭ la apero de la „Unua Libro" de d-ro Zamenhof). Li ekinteresiĝis pri volapuko kaj kontaktiĝis kun ĝia kreinto, pastro M. Schleyer. Sed, kiam en la jaro 1887 aperis la libreto de D-ro Esperanto, Grabowski trovis en ĝi plenan solvon de la problemo de internacia lingvo. En la jaro 1888 li veturis el Ruslando tra Varsovio, konatiĝis tiam persone kun d-ro Zamenhof kaj tiam okazis la unua en la mondo interparolo nur en Esperanto.

De post tiu ĉi tempo li komencis partopreni tre vigle en la poresperanta movado. Li entuziasme kunlaboris kun la unua esperanta gazeto „La Esperantisto", aperanta en Nurimbergo (Nürnberg) en la jaroj 1889—1905, eldonis kontinuon de la unua Lernolibro de Esperanto kaj aron da tradukoj — poeziaj kaj prozaj — el la plej ĉefaj eŭropaj lingvoj (kun speciala favoro por la pola poezio). En Ivanovo-Voznjesjensk li organizis unu el la unuaj esperantistaj rondoj de la tiama carisma Ruslando, kaj samtempe kontaktis konstante kun la tiame nelegala pola esperantista organizaĵo en Varsovio (jaroj 1891/93), al kiu apartenis tiaj posteaj famuloj, kiel: Leo Belmont (Leopold Blumental), Józef Waśniewski, d-ro Róbin, kaj malpli konataj — S. Goldberg, J. Janowski, kaj aliaj.

En la „kriza" periodo de Esperanto, dum la provoj de reformoj (1904), sub la influo de interlingvisto de Wahl, Grabowski deflankiĝis de la esperantista movado kaj kontaktiĝis kun internacia grupo por interlingvaj studoj, gvidata de prof. Wahren en Hanovro. En la organo de tiu ĉi grupo, s.t. „Lingvist", li publikigis siajn studojn pri la problemo de internacia lingvo. En ili, li venis al la ideo de „modernigita latino". Sed, malkuraĝigita pro malsukceso, pri kio li bone konsciis, li forĵetis siajn studojn en tiu ĉi direkto kaj revenis al laboroj pri pola faka teknika terminaro. Nur en la jaro 1904, vidante la vivantecon de la poresperanta movado, li revenis en ĝiajn vicojn prenante tuj en ĝi gvidajn postenojn oferitajn al li. Ekzemple:

— En Varsovio li organizis la unuan *legalan* Esperanto-Societon ĉ. la jaro 1906;

— Poste li estris la nove fonditan „Polan Esperanto-Societon", laborante samtempe por Esperanto sur la internacia kampo, kie lia aŭtoritato kreskis ĉiam pli.

— En la jaro 1905 Grabowski estis sekretario de la I Internacia Kongreso de Esperanto en Bulonjo sur Maro kaj eniris la Konstantan Lingvan Komitaton (la postean Akademion de Esperanto), fonditan de tiu ĉi Kongreso.

— En la jaro 1908 li fariĝis membro de la Esperanta Akademio, kiel direktoro de la Gramatika Sekcio.

— En la jaro 1912 li estis vicprezidanto de la VIII Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo.

— Samtempe li publikigis aron da tradukoj el la pola kaj alilanda literaturo. Kiel la bilanco de tiu ĉi laborado, estis eldonita en la jaro 1913 lia fama antologio de plej belaj poeziaĵoj el 30 lingvoj, inter ili tre multe da polaj, sub la titolo „El Parnaso de Popoloj". La pola estis prezentita ĥronologie — de Krasicki ĝis Antoni Lange — XVIII ĝis la XX jarcento. Krome aperis tiam lia traduko de la dramo „Mazepa" de Słowacki, kiun li mem reĝisoris, prezentita dum la VIII UK en la krakova Urba Teatro. La samo koncernas lian tradukon de „Halka" de Moniuszko-Wolski. Ĉi-lasta estis la u n u a opera prezentado en la historio de la Esperanto-movado.

Post la eksplodo de la unua mondmilito li trovis azilon en Toruń, kaj poste en Bydgoszcz (havante

LEGANTOJ AL LA REDAKCIO

En unu el la lastaj numeroj ni petis la Legantojn esprimi sian opinion pri la enhavo kaj formo de nia revuo. El multaj alvenintaj leteroj ni elektis kelkajn, kiuj — pli malpli — formas la sintezon de la ĝenerala opinio. Laŭ nia konvinko, tiu ĉi nova rubriko nepre devas transformiĝi en konstantan eron de la revuo. Ĉi tion ebligos daŭre alvenantaj leteroj.

„Sekvante la voĉon de Via instigo diskuti pri nia revuo, (...) mi spitas la denaskan malinklinon skribi kaj prenas parolon en la diskuto. Por mi (kaj kredeble por ni ĉiuj) grava estas la ĝusta nivelo de la revuo, kiun la polaj esperantistoj plene meritas. Tial, pardonu al mi, se la pritasko de la ĝisnunaj numeroj estos severa.

Kompreneble mi konscias, ke mia prijuĝo povas esti ŝancelita per argumentoj de la speco: „bone estas, ke ĝi (la revuo) estas" , „kion vi mem faris, samideano, por ke la gazeto estu pli bona?" ktp. Ĉiu tamen ne supraĵa observanto de tiuj ĉi aferoj ne elektos ĉi tiun stilon reagi al eventualaj vortoj de kritiko, ĉar la bono de la afero devas superpesi la personajn motivojn.

Ĉu nia revuo, aperanta post la longa periodo de la neekzistado — plenumis niajn atendojn, aŭ ĉu ĝi estis nur ankoraŭ unu ne eksplodinta obuso, kreitaĵo, al kiu oni povas aŭguri rapidan velkon? La respondo, miaopinie, povas esti nur unu: nia revuo estas — en sia nuna formo — granda miskompreno kaj neniel konformas al la nuntempa esperantisto (ne komencanto, ĉar por tiaj ĝi ne estas destinita).

Kaj jen kelkaj kaŭzoj pravigantaj mian prijuĝon:

1) „PE" ne havas la ecojn de originala revuo, almenaŭ en iu detalo, distinganta ĝin disde la multegaj similaj revuoj ekzistantaj en nia movado kaj kaŭzanta, ke la eksterlandoj aĉetados ĝin. Krom la titolo, kies formo estas iom strangigita, sed iel moderna, ne estas en tiu ĉi gazeto io ajn moderna, kaj la tuto similas iom al gazeteto por junularo aŭ al iu fabrika gazeto.

2) Ĝi ne estas revuo havanta la ecojn de pola gazeto, kaj ja kredeble ni kapablas substreki tiun ĉi polecon per priparolado de niaj aferoj ne nur esperantistaj, sed ankaŭ de gravaj enlandaj aferoj (politikaj kaj kulturaj). En la nuna formo, la revuo estas nebuloza, kaj artikolojn indaj trarigardon kaj tralegon mi vidas plej multe du-tri en numero. (...)

3) La revuo devas teni viglan kontakton kun la legantoj. Tial konstante devus en ĝi esti io por ili. Ekzemple esperantista kalendaro, iu poŝtkarto, insigno, glumarko, enketo ktp. Terura malvarmo blovas el la nuna „PE".

4) Vi devas memori, ke por ke gazeto estu esperantista — ne sufiĉas nomi ĝin tiel. Devas forpasi minimume unu jaro, ke ĝi fariĝu konata en la esperantista mondo. Krome, „PE" devas rekonstrui la konfidon, kiun ĝi perdis pro la neregula aperado. La homoj treege ne ŝatas tiajn aferojn kaj konjektas ion suspektindan.

5) Domaĝe, ke al la diskuto oni ne inklinigis nin pli frue per alsenditaj enketiloj. Tiam nia revuo povus esti sensacio. Se vi jam decidis elekti tian formon, vi devas porti difinitajn konsekvencojn. Mi ne volus esti malbona profeto kaj tial mi skribas por ankoraŭ savi tion, kio estas savebla. Ĉi tiuj unuaj numeroj estos dume malpropagando de „PE". Sed ni ne rezignaciu kaj „ni prenu niajn aferojn en niajn manojn", kiel diras kooperavanoj. Mi ligas salutojn".

Nowy Sącz, 28.III.1971.

ALEKSANDER GRELA

Esperantisto" la samajn nomojn de membroj de la redakta komitato... Kaj tiaspeca gazeto devas fariĝi tribuno por la tutpollanda esperantistaro!

Domaĝe estas, ke neniu el la simplaj esperantistoj povas engrimpi la „ensorĉitan" rondon de eminentuloj.

Kun samideanaj salutoj."

Skarszewy, 17.III.1971.

ZDZISŁAW PAPIEROWSKI

„Mi tralegis vian saĝan artikolon en la 5 n-ro de „Pola Esperantisto" — „Iom kontraŭ nin mem" („Hirtaj pensoj"). Mi citas: „El la rimedo ni faris la celon. (...) Ni flegas por ni mem idolon".

LA TRIBUNO DE LEGANTOJ

„En la lasta numero de „Pola Esperantisto" vi petis la legantaron, ke ĝi sendu al la redakcio siajn rimarkojn. Legante la diversajn numerojn de nia ununura ligilo kun la pollanda esperantistaro, mi rimarkis, ke nur de tempo al tempo oni donas por la legantaro iujn literaturaĵojn — versaĵojn aŭ rakontojn. Regule nia gazeto enhavas nur multegon da diversaj artikoloj en la formo de informoj pri nia pollanda movado. Mi tamen pensas ke nia gazeto kiel informilo ne havas sencon. Ja nin, esperantistojn, oni ne devas konvinkadi pri la valoroj de nia lingvo; tiun ĉi celon devas servi nur alilingva gazetaro!

Mi bonege scias, ke tiaspecaj mallongaj sciigaj anoncoj estas nepraj de tempo al tempo, por sciigi la esperantistaron pri la disvastiĝado de la lingvo. Sed, troigante, vi kaŭzas, ke ĉiu numero fariĝas iom enua, kaj por novbakitaj esperantistoj treege malsimpla, precipe, se oni tie aŭ alie trovas neologismojn ne konatajn en la zamenhofa stilo!

Kial mi devas tion ĉi skribi? Simpla afero. Neniu bone povas scii la lingvon, se li ne povas legi ion simplan kaj interesan. Interesiĝon naskos nur tiu verkaĵo, kiu povas helpi riĉigon de la lingvokono. Ĉu ne estus pli bone, ke vi de tempo al tempo presigu versaĵojn aŭ rakontojn, novelojn verkitajn de simplaj esperantistoj, kio eble ankaŭ por vi estus plezura, se hazarde vi eltrovus iun talentan Esperanto-verkiston?

Ofte mi havas kontakton kun pli aŭ malpli viglaj aŭ spertaj esperantistoj kaj dum diskutado ili diras, ke tro ofte oni vidas en „Pola

Mi ankaŭ ofte demandas: kial? Mi — krom la rusa lingvo — lernis ankaŭ la anglan, germanan, francan kaj Esperanton — kiel interkomprenilojn. Sed mi ne nomas min anglisto, francisto?!

(...) Mi proponas, ke la paĝo „Hirtaj pensoj" estu konstanta en via revuo. Polemiko, diskutoj, reciprokaj interparoloj akrigas la pensojn.

(...) Laŭ mia opinio, necesas unuigi niajn fortojn, financojn. Direkti ilin por la Esperanto-disaŭdigoj, intertelevido, gazetaro. Ĉu ne pli bone — kiel skribis Jerzy Grum — koncentri en Varsovio ĉiusemajnan gazeton. Ne nur „informilon", kiel ekzemple la bulgara „Ripozoj", sed ankaŭ literaturan gazeton, kiu enhavus tradukojn el la monda klasiko, kaj ankaŭ originalajn verkojn. La multnombraj komencantoj bezonas gazeton kiel legomaterialon por la praktikado de la lingvo."

G. S. SELUGIN
Pustoŝka (Sovetunio)

„Kvankam la redakcio de „PE" ne honoris ĝis nun miajn multnombrajn leterojn kun tradukaĵoj per plej mallonga respondo, mi tamen faras ankoraŭ unu provon. Tio ĉi ne estas obstineco de grafomaniulino, sed profunda konvinko, ke la tradukitaj de mi (...) dignas esti aperigitaj en la organo de la Pola Esperanto-Asocio".

Kun samideanaj salutoj.

Zabrze 1.IV.1971.

LEONIA FREUNDLICH

REDAKCIO AL LA LEGANTOJ

Estas neeble ne konsenti kun pluraj formuloj de s-ro Aleksander Grela, kvankam — ni opinias — ke la tri lastaj numeroj de „PE" jam montras certan progreson en la senco, pri kiu skribis la leganto.

Atingita estas la akurateco de la aperado kaj ĉi-rilate „PE" reakiris iom post iom la konfidon de siaj legantoj.

Kredeble, „PE" ekhavas iun pli distingeblan „vizaĝon". Ĝi komencas esti gazeto, pri kiu oni povas diri, ke ĝi aperas en difinita lando. Gravaj pollandaj aferoj komencas trovadi por si lokon sur la paĝoj de „PE".

Pri la formoj de la kontakto kun la legantoj ni daŭre pensas kaj tiu ĉi nova rubriko videble estas la unua paŝo ĉi-direkte.

Estas ege malfacile, disponante 16 paĝojn por la periodo de du monatoj, ĝuste pesi la proporciojn inter la informa, raporta parto de la gazeto kaj ties publica parto.

La gazeto, tamen, estas legata ankaŭ de multaj komencantoj kaj — tamen — ankaŭ por ili parte dediĉita. Verŝajne estas nature kaj ne kontesteble, ke ni aperigas verkaĵojn de polaj aŭtoroj — tradukite en la internacian lingvon. De tempo al tempo ankaŭ originalajn versaĵojn, novelojn, rakontojn de polaj kaj alilandaj Esperanto-kreantoj. Al la literaturo ni tamen ne povas dediĉi pli multe da spaco, ĉar tiam — laŭ nia opinio — la proporcioj estus ŝancelitaj.

Pro la dumonateco, la informoj en „PE" havas prefere la karakteron de kroniko. Laŭ nia opinio, ili tamen estas nepre daŭrigenda parto de la revuo. Oni ne rajtas forgesi, ke la atingaĵojn de la Pola Esperanto-Asocio kiel la tuto — konsistigas la ĉiutaga pena laboro de la vicaj aktivuloj. Ili havu sian lokon en „PE".

Ne ekzistas — kiel supozas s-ro Papierowski — iu ajn „ensorĉita" rondo de eminentuloj — se temas pri la publikigado en „PE". Pri aperigo aŭ neaperigo de iu ajn artikolo aŭ literaturaĵo en „PE" decidas nur kaj ekskluzive la publica (aŭ literatura) nivelo de la verkaĵo kaj la nivelo de la uzita Esperanto. La redaktoroj ne povas skribi „anstataŭ" la aŭtoroj. Esperanto estas simpla en siaj fundamentoj, sed krome oni devas ĝin lerni, studi kiel ĉiun ajn alian lingvon, pri kio ŝajnas forgesi skribemuloj.

G. S. Selugin multrilate pravas. La ĉefa peko de la movado estas troa larĝigado de la fronto, se oni povas tiel diri. Ni aktivas sur tro multaj kampoj, kaj krome ne kunordigite kun alilandaj movadoj kaj la efikoj ne egalas la investitajn tempon, laboron kaj monon. Ni prefere elektu malpli da agadkampoj, sed konsekvente disvolvadu la agadon sur ili kaj pli profitu la fruktojn, kiujn ili naskas. Do — prefere ni mallarĝigu la fronton, aliflanke pliprofundigante ĝin.

Estas malbela kutimo ne respondi ĝustatempe la leterojn; ni pente frapas la bruston, s-ino Freundlich.

Oni ne rajtas rifuzi al vi certan talenton. Aliflanke, bonvolu kredi al ni, vi ankoraŭ tro malmulte „investis" en vian talenton. La tradukaĵoj, kiujn vi alsendis — abundas je adasismoj kaj en la nuna formo ne estas preseblaj. Se ni rajtas konsili, ni proponus, ke vi pristudu „Parnasan gvidlibron", kiu devus esti la „aboco" de ĉiu poeziemulo, des pli, se tiu mem prenas plumon en la manon. Tion sekvu legado de multaj ekzistantaj trezoroj de nia originala (ekz. „La infana raso" de William Auld) aŭ tradukita (ekz. „La tragedio de l' homo" de Imre Madach) literaturo.

Jen la provaĵo: *„Plejadoj la oktobra jam estas stelaro. Brilas, kiel vinbero inter steloj svarmaj, En lumo arbar' flava, kiel ĉevalaro, Kuranta al arĝenta trinkigej' malvarma".*

NEPARDONEBLE. J. G.



EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ
POR REKONSTRUO
DE LA REĜA KASTELO EN VARSOVIO

1.	Ludwig PICKEL Nuernberg, GFR	— 50 DM + eldonaĵoj je la sumo de 75 DM (laŭ adreso de PEA); ankaŭ propagandado de la kampanjo en GFR pere de „PILO-PRESS"
2.	Asta CHRISTENSEN Valby, Danlando	— 5 dol. (laŭ adreso de Pola Radio)
3.	Eduards DANCIS Valmiera, Sovetunio	— 10 rpk (laŭ adreso de PR)
4.	Tore FORS Kaevlinge, Svedujo	— 20 svedaj kronoj (laŭ adreso de PR)
5.	Albrecht METZKES Moenchengladbach, GFR	— 100 DM (laŭ adreso de PR; ankaŭ librovendado — favore al la rekonstruo de la kastelo
6.	Zdena MATYKOVA Hradec Kralove, Ĉeĥosl.	— 300 zl. (laŭ adreso de PR)
7.	Ottilie SCHMITT Nuernberg, GFR	— 20 DM (pere de „PILO-PRESS")
8.	Anna HARTWIG Nuernberg, GFR	— 10 DM (pere de „PILO-PRESS")
9.	Esperanto-Grupo Nuernberg, GFR	— 20 DM (pere de „PILO-PRESS")
10.	Miguel MANTECA Alicante, Hispanujo	— 200 pesetoj (laŭ adreso de PR)
11.	Salvatore d'ISIDORO Firenze, Italujo	— 2 dol. (laŭ adreso de PR)
12.	K. WELLS Melksham, Britujo	— 1 pundo (laŭ adreso de PR)
13.	Esperanto-Grupo Fuerth, GFR	— 20 DM (al la konto de la Civitana Komitato por Rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio)
14.	Germana Esperanto-Kongreso (partoprenintoj), Nuernberg, GFR	— 177,90 DM (al la konto de la Komitato por Rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio)

vadoj. Bonvolu al mi permesi esprimi mian altan rekonon por la estraroj de la Societo por la Internaciaj Kontaktoj kaj de la Aŭstria Esperantista Federacio pro la organizo de la hodiaŭa solenaĵo kaj pro la pliriĉigo per la belega muziko de alia polo, Frederiko Chopin.

Mi volas fini mian mallongan alparolon per akcento persona, nome per la deziro en la plej proksima tempo esti denove ĉe vi, sed tiam jam sciante paroli la lingvon de la estonto, Esperanton!"

La parolinto devis danki pro la verva aplaŭdo pro sia parolado, kiu prezentis la opinion kaj ideojn pri nia komuna afero, viditajn tra la perspektivo de ektserlandano, de diplomato el la patrujo de Zamenhof. S-ro Vokal, dankinte al nia nova samideano, anoncis disaŭdigon de liaj vortoj per Radio Vieno. Sekve ni aŭskultis la vicprezidanton de AEF, Oberstudienrat d-ron Karl Beckmann, pri „ZAMENHOF KAJ LA ORIGINO DE LA ESPERANTO-LITERATURO". La parolado, certe iam publikigota, en detala maniero analizis la originalan (entute naŭ poemoj) kaj tradukan poezion kaj verkadon de d-ro Zamenhof kaj respondis al la kritiko de la t.n. „fidelistoj", kiuj ja „agnoskas" la grandiozecon de lia arto", ĉiam aldonante al tiuj ĉi laŭdoj siajn „sed". Prof. Beckmann fine konkludis per la aksiomo, „ke nur majstro povas vere superi majstron."

Fermis la unuan parton de la aranĝo du Mazurkoj de Frederiko Chopin. La duan parton garnis interesaj „IMPRESOJ PRI INTERNACIAJ ESPERANTO-KONGRESOJ" — Madrido — Helsinko — Vieno, prezentitaj kolordiapozitive de s-ino Grete Breunlich. Donis ankoraŭ revuon pri la „VIENA ESPERANTO-KALENDARO" s-ro Vokal. La finalo de la edifa okazaĵo estis la Esperanto-Himno.

HUGO KRAUS

POR ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN

En Antverpeno (Belgujo) okazis unua konferenco dediĉita al enkonduko de Esperanto en la lernejojn de Belgujo, Nederlando, Francujo, Britujo kaj GFR. La konferencon organizis Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj. Oni prezentis plurajn prelegojn kaj raportojn dediĉitajn al tiaj aferoj, kiel: edukado de Esperanto-instruistoj, instruprogramoj de la internacia lingvo, rolo de la instruistaj sindikatoj en la enkondukado de Esperanto en la lernejojn kaj ŝtata helpo en la vasta instruado de Esperanto.

ESPERANTO EN BRITUJO

En Britujo, krom la Brita Esperanto-Asocio, funkcias ankaŭ Brita Laborista Asocio de Esperantistoj. Ĝi okazigis sian nunjaran kongreson en Swanwick. Oni debatis ia. super la plua disvastigado de Esperanto inter la britaj laboristoj.

Esperanto estas en Britujo disvastiĝinta ĉefe inter la inteligentularo. Multaj britaj intelektuloj, inter ili konataj sciencistoj, subtenas Esperanton. En la universitato en Oksfordo oni presigas multajn Esperanto-verkojn, kaj en Londono troviĝas la plej granda en la mondo esperanta biblioteko, kalkulanta ĉirkaŭ 40 mil titolojn.

EN POLLANDO

LA PREZIDANTINO DE LA FINNLANDA ESPERANTO-ASOCIO EN POLLANDO

Dum du semajnoj de majo 1971 restadis en Pollando s-ino Irja Klemola, la prezidantino de la Esperanto—Asocio de Finnlando. Ŝi vizitis Szczecin, Varsovion kaj Krakovon, en kiuj urboj ŝi prelegis kun diapozitivoj pri Finnlando kaj finna Esperanto-movado.

Dum la restado en Varsovio, s-ino Klemola renkontiĝis kun membroj de la Prezidumo de la Cefa Estraro de PEA dum specala, solena Kunsido kaj priparolis la eblojn de kunlaboro inter EAF kaj PEA. Plian informojn pri la restado de s-ino Irja Klemola vi trovos en la sekva numero de „PE".

S-ino Irja Klemola en la Parko Łazienki en Varsovio – en la fono la monumento al Frederiko Chopin, kie somere ĉiudimanĉe okazas la konataj pianistaj koncertoj de Chopin-muziko – en la libera aero



S-ino Irja Klemola en la Junulara Palaco en Szczecin kun scivolo aŭskultas klarigojn de s-ino Stefania Palica pri nova E-ekspozicio, aranĝita de la geknaboj.

Pola Esperanto-Asocio
Ĉefa Estraro

Karaj Amikoj,

Akceptu mian tutkoran dankon pro la neforgesebla vizito en Pollando, kie mi estis feliĉa kaj gaja kiel floreto sur la manplato (laŭ la finna esprimo). Nun via lando estas al mi pli proksima, pli kara ol antaŭe kaj mi pli bone komprenas ĝian historion kaj sorton ol tiam, kiam mi — kiel juna lernantino — legis niajn historiajn lernolibrojn. Kaj mi neniam forgesos la afablecon de la poloj, puran kaj modestan afablecon, kiun mi ĉie renkontis.

La vizito al la juda tombejo, kie kuŝas la kreinto de Esperanto, estas rememoro, kiu plej forte akcentas por mi, ke Esperanto estas afero de la malgrandaj nacioj kaj tial la kunlaboro inter la polaj kaj finnaj esperantistoj estas tiel grava, kaj nun certe estos pli firma ol antaŭe .

Miajn varmajn salutojn el Finnlando, kie nun floras la siringo kaj la pomarbo. Nun mi do vivas la duan printempon ĉi-jare. Ankoraŭfoje mian tutkoran dankon ankaŭ pro la unua printempo en Pollando.

Via
Irja Klemola

Listo de la delegitoj por la Landa Kunveno de Delegitoj

En la kadro de la enkondukado de la nova Statuto de PEA en la vivon, okazis vojevodiaj kunvenoj de delegitoj, rezulte de kiuj oni elektis delegitojn por la Tutlanda Kunveno de Delegitoj de la Pola Esperanto-Asocio, kiu okazos en Poznań en la tagoj 12—13 de novembro 1971.

Jen la listo de la elektitaj delegitoj:

1. Andrzejczyk Franciszek — Bydgoszcz
2. Andrzejewska Wanda — Wrocław
3. Baranowski Czesław — Koszalin
4. Bąk Irena — Konin
5. Bentkowski Stefan — Warszawa
6. Bieliński Paweł — Bydgoszcz
7. Bolanowska Helena — Łódź
8. Brichta Leopold — Kraków
9. Bujwid Ewa — Wrocław
10. Dobosiewicz Krystyna — Lublin
11. Dołgowska Józefa — Szczecin
12. Domaszewicz Mariusz — Wrocław
13. Drawczyk Andrzej — Gdańsk
14. Drzewiecki Euzebiusz — Poznań
15. Dryja Jerzy — Poznań
16. Folcik Edward — Wrocław
17. Frańczuk Stanisław — Kraków
18. Gibczyńska Jadwiga — Nowa Huta
19. Golec Józef — Sopot
20. Górnicki Zdzisław — Kłodzko
21. Greger Jadwiga — Gdynia
22. Grela Aleksander — Nowy Sącz
23. Grum Jerzy — Warszawa
24. Grzębowski Andrzej — Bydgoszcz
25. Grzelak Jadwiga — Łódź
26. Gucwa Jerzy — Gdańsk
27. Halemba Alfons — Opole
28. Jałowiecki Romuald — Kielce
29. Jodłowska Elżbieta — Warszawa
30. Karwat Andrzej — Warszawa
31. Kess Kamilla — Lublin
32. Kiełpińska Ludomira — Bydgoszcz
33. Kłopocka Zofia — Łódź
34. Kolender Edmund — Świnoujście
35. Kołaczkowski Andrzej — Lublin
36. Kordylewski Leszek — Kraków
37. Kosieniak Lech — Warszawa
38. Kostecki Marian — Kraków
39. Kotarska Jadwiga — Gdańsk
40. Krauze Ryszard — Pabianice
41. Kozioł Sylwester — Wrocław
42. Lasiński Aleksy — Wrocław
43. Lassak Marek — Bydgoszcz
44. Łazowy Andrzej — Toruń
45. Łomnicki Adam — Kraków
46. Łowczak Sławomir — Lublin
47. Majewski Eugeniusz — Lublin
48. Madej Stanisław — Tomaszów Mazow.
49. Małycha Kazimierz — Bydgoszcz
50. Marszałkowski Andrzej — Kartuzy
51. Marciniak Mirosława — Warszawa
52. Mażys Jerzy — Olsztyn
53. Misiuro Irena — Poznań
54. Muszkieta Henryk — Gdynia
56. Nemere Teresa — Toruń
57. Norwicz Krystyna — Kraków
58. Pakalska Stefania — Warszawa
59. Palica Stefania — Szczecin
60. Pałaszewski Władysław — Gdańsk
61. Pettyn Andrzej — Warszawa
62. Piekarska Zofia — Chełmno
63. Piotrowski Lech — Białystok
64. Pleśnar Adam — Wrocław
65. Posłuszny Jerzy — Wrocław
66. Poterucha Barbara — Wrocław
67. Rams Stanisław — Kielce
68. Ratajczyk Jeremiasz — Warszawa
69. Rokicki Ryszard — Warszawa
70. Rutkowski Roman — Bydgoszcz
71. Sigda Stanisław — Starachowice
72. Skalski Roman — Trzemeszno
73. Sochatyński Wilhelm — Przemyśl
74. Stasińska Krystyna — Poznań
75. Staszczak Bolesław — Warszawa
76. Suszyńska Wacława — Olsztyn
77. Świstak Stanisław — Bochnia
78. Tomaszewski Wiesław — Warszawa
79. Tomczak Lucjan — Włocławek
80. Tyblewski Tyburcjusz — Jelenia Góra
81. Tyszkiewicz Marian — Wrocław
82. Uśpieński Jerzy — Warszawa
83. Wiecki Jerzy — Elbląg
84. Wicińska Jadwiga — Warszawa
85. Wierzejewski Borys — Poznań
86. Wolak Janusz — Oliwa
87. Wojtakowski Edward — Wrocław
88. Zapolska Halina — Warszawa
89. Zawada Jan — Warszawa
90. Żmijewski Krzysztof — Białystok
91. Żywica Daniela — Bydgoszcz

La listo ne entenas la nomojn de delegitoj el la vojevodio de Katowice, kie ankoraŭ ne okazis elekto de la delegitoj.

VESPERO EN LA HUNGARA INSTITUTO

La 10 de majo 1971 okazis literatura vespero, organizita de la Varsovia Filio de PEA kune kun la Hungara Instituto en Varsovio. Prelegon pri la temo: „La nuntempa hungara literaturo" prezentis d-ro Ferenc Jaki. En la arta parto kantis kaj deklamis artistoj el Budapeŝto — Anna Band kaj Tomas Cser.

La aranĝon oni organizis en la kadro de la realigado de la kontrakto inter la Pola Esperanto-Asocio kaj Hungara Esperanto-Asocio pri la reciproka helpo kaj kunagado, pri kio ni skribis en la 3/71 numero de nia revuo.

RENKONTIĜO de varsoviaj esperantistoj ĉe la tombo de Antoni Grabowski

Dum la solenaĵo s-ano Jerzy Gralak, metinte florojn sur lian tombon, diris jenon: „Karaj gesamideanoj! Hodiaŭ ni kolektiĝis antaŭ la tombo de nia granda, elstara esperantisto, Antoni Grabowski, por omaĝi la 50 datrevenon de lia morto. Antoni Grabowski kiel la unua homo interparolis kun Ludoviko Zamenhof en la internacia lingvo. Sian tutan vivon li dediĉis al propagandado de Esperanto. Li estis la unua esperanta poeto kaj oni nomis lin „patrio de la esperanta poezio". La historio de nia lingvo montras klare, ke la granda ideo de Zamenhof, disvolvita de Antoni Grabowski, estas prava.

Nia hodiaŭa ĉeesto apud la tombo de Antoni Grabowski estu esprimo de nia omaĝo kaj dankemo al ĉi tiu granda homo, kiu ĝis la fino de sia vivo restis fidela al la ideo de Esperanto".

„ESPERANTO — NE NUR HOBIO"... LA DUAN FOJON!

Ni ĝoje komunikas, ke la 23-an de aŭgusto je la 18.00 ĝis 18.30 horo en la kadro de la III enlanda programo de la Pola Radio estos aŭdigita la dua elsendaĵo el ĉi tiu ciklo; prilaborata de red. Jerzy Uśpieński kaj Barbara Sokalówna. Ni rememorigu, ke ĝi estas radia magazino prezentanta diversajn seriozajn aplikojn de E-o. La tria programo de PR, de multaj taksata kiel la plej altranga, estas aŭdebla en la tuta Pollando kaj kredeble en ĉelimaj provincoj de la naĵbaraj landoj. Ĝi elsendiĝas per ultrakurtaj ondoj el Varsovio kaj ĉiuj provincaj radiostacioj, kies frekvencojn indikas la gazeto „Radio i Telewizja". Krome, la III programo disaŭdiĝas per la mallongaj ondoj — 25, 41 kaj 49 metroj. Ĝi do estas aŭdebla en la tuta lando. Aŭskultu do la programon kaj aŭskultigu neesperantistojn. Se vi volas daŭrigon de la programo — *nepre skribu al la redakcio.* La adreso estas: Polskie Radio, Warszawa 1, Skrytka 46, Progr. III, Redakcja Magazynów.

MI HODIAŬ VIN NE VENOS

(DZIŚ DO CIEBIE PRZYJŚĆ NIE MOGĘ)

Ni publikigas la partizanan kanton el la teatraĵno sub la sama titolo (de W. Budrecki kaj S. Kanicki), ludatan en Varsovio ekde la jaro 1967. La teatraĵo estas dediĉita al polaj herooj, batalintaj kontraŭ la hitleran faŝismon — en la lando mem kaj sur ĉiuj militkampoj de Eŭropo, dum la II mondmilito.

Melodio: L. Budrecki
Teksto: S. Kanicki
Esperanto-traduko: E. Wojtakawski

Mi hodiaŭ vin ne venos —
iras mi arbaron tuj;
Min ekvidi vi ne penu —
post fenestro nur nebul'.

Ne demandu vi min, kien,
Ĉu atendas min geril' —
Mi ne restos plu ĉi tie, } *bis*
Mia devo la konspir'.

Se mi hejmen ne revenos,
mian kampon plugu frat',
Ostojn miajn tero prenos,
fekundiĝos la terplat'.

Vi surkampe somermeze
dum rikolto de sekal'
ĝin amkisu plej karese — } *bis*
Mi plu vivos en spikar'.

Ritme, kvazaŭ marŝe